

Heinrich Heine,
Softe vibras tra l'anim'

tradukita de Kálmán Kalocsay

Softe vibras tra l'anim'
melodi' tenera,
flugu al la malproksim',
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
kaj se tie ĉarme
ridos roz', en mia nom'
ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".